Hans Christian Andersen,

Infanrimaĵo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Pupo mia, dancu vi!
Kiel bela estas ĝi,
la fraŭlin'! Kaj ankaŭ la
kavalir' aspektas ja
en la blua frako tre
elegante, aŭ ĉu ne?
Estas belaj li kaj ŝi.
Pupo mia, dancu vi!

Jen la pup' de l' lasta jar',
kun la flava kapharar'!
Estas ĝi la Lizinet',
la malnova lud-pupet'.
Venu, olda amikin',
mi nun volas lavi vin.
Vi nun dancu ĉiuj tri!
Rigardindas tio ĉi!

Dancu, mia pupo kun
la aliaj pupoj nun!
Paŝo flanken, unu klin'!
Ĉiam tenu rekte vin!
Vi turniĝu kiel rad',
tre sanigas la dancad'!
Plaĉas tio ĉi, ĉar vi
estas ĉarmaj ĉiuj tri.

...

Hans Christian Andersen,

Ein Kinderreim

tradukita de Manfred Retzlaff

Tanze, tanze, Püppchen mein!
Nein, wie ist das Fräulein fein!
Ebenso der Kavalier,
In dem Rock gefällt er mir,
Mit den Handschuhn und dem Hut,
Auch die Hosen stehn ihm gut.
Er ist fein und sie ist fein.
Tanze, tanze, Püppchen mein!

Lieschen mit dem blonden Haar,
Püppchen aus dem letzten Jahr,
Ist gewaschen und geputzt,
War doch vorher sehr verschmutzt,
Ist jetzt wieder ganz wie neu.
Kommt zu mir nun alle drei!
Ihr sollt mit mir tanzen gehn,
Lohnt sich wirklich anzusehn!

Tanze, tanze, Püppchen mein,
Tanze richtig, so ist's fein!
Fuß nach außen, hier entlang!
Siehst so süß aus, bist so schlank!
Neige dich und dreh' dich rund,
Das macht Spaß und ist gesund!
Das ist niedlich anzusehn,
Ja, ihr drei seid alle schön.

...

Traduko de la Dana poemo "Et børnerim" de Hans Christian Andersen *(Johano Kristiano Andersen', ∗1805-04-02 – †1875-08-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1991-08.*

MR-248-1 / Arg-246-497 (2005-04-22 19:40:53)

Traduko de la Dana poemo "Et børnerim" de Hans Christian Andersen *(Johano Kristiano Andersen', ∗1805-04-02 – †1875-08-04) en la Germanan de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1991-08.*

Arg-246-498 (2004-06-20 14:24:47)